

NIA VOĈO  
Madrída Esperanto-Liceo  
San Alejandro 6-4<sup>B</sup>-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

NOVEMBRO 2000

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:

<http://www.ciudadfutura.com/esperanto>

#### EKSTERLANDE

Denove Augusto Casquero translokiĝis al Slovakio ĝis decembro, en la nuna okazo sen la familio, li iris por finlerna la slovakan lingvon. Kiel kutime li loĝas en esperanta etoso.

En Oktobro, la Filharmonia Orkestro de Olomouc (Ĉekio) ludis la unuan prezenton iam ajn de simfonio por orkestro kun tekstoj en esperanto, de usona komponisto David Gaines. En 2001 aperos registrado de la simfonio por kompaktdiska eldono.

#### REELDONO DE "Nuevo método de esperanto"

La nova eldono (tria) de la verko de F. de Diego aperos komence de la jaro. Pro kostaj kialoj la teksto ne estis tajpita denove, MEL reprenis ĝin kun korektitaj eraroj, datumoj aktualigitaj kaj kun tre utila laŭtema indekso. La eldonisto estas Gram Ediciones S.L., kiu eldonas lernolibrojn pri lingvoj. Li distribuos la verkon en ne-esperantista komerca reto kaj MEL kontrolos la esperantan merkaton.

#### ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILOJ

Marcos Cruz partoprenis radioprogramon en RNE-1, "Cita con Pilar" kiun gvidas Pilar Socorro. Unu horo estis dediĉita al esperanto. Jen opinioj de Marcos mem: "La etoso dum la programo estis tre agrabla kaj plaĉa... la tuta afero konsistis el senbride legadi la retmesaĝojn el la ekrano kaj aŭskulti la opiniojn de la telefonintoj... Mi supozis, ke mi men povos elekti la muzikon, sed ne estis tiel...". Kelkaj telefonintoj parolis esperante pri diversaj temoj kaj "mi interrompos kaj gvidetos mem la aferon por profiti la temon kaj enkonduki niajn direndojn" La rezulto estis ege pozitiva kaj Pilar Socorro rekontakto kun Marcos por nova programo pri esperanto, post 6 monatoj. "Eble por la unua fojo, post dekoj da radiointervjuoj, mi ĉe la fino sentis nin tre trankvila, ĉar mi intime spertis ke la afero tre interesis kaj plaĉis al la ĵurnalistoj ĉirkaŭ mi, kaj tiu bona etoso kontakto ĝis la publikon"

"El Correo Español-El Pueblo Vasco" publikigis tutpaĝan artikolon pri la Grupo de Bilbao.

Martí Guerrero prezentis sian televidan e-kurson en kanalo 54 de Hospitalet kaj Baix Llobregat.

La revuo "Semana" (2000-10-11) inkludis TTT-paĝon de HEF laŭ la titolo "Idiomas exóticos". Esperanto aperas kune kun la japana kaj la ĉina. La novaĵo havas kelkajn erarojn kiel la dato en kiu naskiĝis esperanto, ktp.

#### EŬROPA UNUIĜO

La franca deputito Christian Bourquin proponis al la franca ministro respondeca pri la eŭropaj rilatoj antaŭenigi la uzon de Esperanto kiel lingvo de Eŭropo. Responde al la deputito Hervé Gaymard, post instigo de la asocio 'Espervive Savoie', la ministro de nacia edukado, Jack Lang, respondis (18.08.2000) ke li prenis konon de la levitaj demandoj kun intereso kaj aldonis: "Mi tuj taskas la koncernan servon pristudi tiun dosieron kun plej granda zorgo kaj ne mankos informi vin pri la sekvoj kiuj estos al ĝi alportitaj". Tio estas sinteno senprecedenca jam de jardekoj.

En la Eŭropa Kongreso de Esperanto en Oostende oni proponis ke Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) malfermu oficejon en Bruselo

La Prezidanto de EEU parolis en la Itala senata komisiono pri Eŭropa Komunumo. Nome de EEU kaj de Itala Esperanto-Federacio li proponis "starigi konstantan konferencon pri lingvoproblemo en Eŭropo, celantan esplori la diversajn eblajn opciojn, kun la respektivaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. Inter tiuj eblaj opcioj troviĝas tiu proponata de planlingvo, specife de esperanto" kaj li petis al la eŭropa Parlamento "adopti rezolucion favore al procedo de elekto de komuna lingvo"

HISPANIO

Komenciĝis en Kordovo elementa e-kurso, kiun organizas la Fondaĵo "Sin Barreras de Comunicación", kun la kunlaboro de Andaluza Esperanto-Unuiĝo. Aliĝis pli ol 23 personoj, inter kiuj troviĝas universitata profesoro, emeritulo, gimnaziano kaj multaj studentoj de la filologia kariero. Por ĉeesti la kurson oni devas pagi 3.000 Ptojn, kontraŭ ĉi tiu mono la Fondaĵo donos la materialon (libro-Adúriz + vortaro + kajero).

Jen la teksto en esperanto de la Asturia Himno (Asturias Patria Querida) (Antaŭen julio 2000)

Amata land' Asturias	de la dolĉa fianĉin'.
Vin amas mi tre korvame!	Se la dolĉa fianĉin'
Mi ĉiam esti deziras	ne volus ĝin por ornam' mi,
en vi. Vi logas min ĉarme.	spite floron de l'arbo
Mi supergrimpos al arbo,	ŝiri decidiĝis jam.
floron mi ŝiros de ĝi,	
por la balkonon ornam	

ESPERANTO EN INTERRETO

La ret-paĝo de Bankinter ([www.km0.com](http://www.km0.com)) inter siaj distraĵoj kaj informaj servoj, ĉe "lingvoj" aperigas ligon al "Esperanto, la internacia lingvo". Per tiu vojo oni alvenas al "esperanto.net", kaj de tie oni havas aliron al informoj pri Esperanto en dekoj da lingvoj inter ili la hispana kaj la la retpaĝo de HEF.

La ĵurnalo "El Mundo" adoptis novan sistemon por ĝenerala serĉado (Ariadn@ per sistemo Google), se vi provas ĝin serĉante "esperanto". Nekredeble: ĝi ofertas 1.560.000 rezultojn! Inter la dek unuaj, aperas unu aloke la "Esperanto-Multlingva Inform-Centro" ([www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)).

HEF ANGULO

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: [admin@esperanto-es.org](mailto:admin@esperanto-es.org)

La Biblioteko "Juan Régulo" de HEF ricevis donacon de diversaj esperantaj materialoj, unu el la donantoj estis Venancio Monsálvez, antikva membro de MEL, kiu antaŭ jaroj redaktis "Nia Voĉo"-n. S-ino Carmen Alafont donis valizon plenan de libroj kaj revuoj, apartenintaj al ŝia frato. Dankon al ĉiuj!

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelego: Lundo, 20-a de novembro "Israelo, sidejo de Universala Kongreso de Esperanto"  
Angelita Sanz

Noto: Tiu ĉi jaro la Madrida Esperanto-Liceo celebros la Zamenhofan bankedon en januaro. En decembro, eble, ni kunmanĝos kun la Grupo "Fido kaj Espero" en Valladolid.

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4ºB. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal